La 9an de julio 2015

Du kantoj temantaj pri la Katastrofo

Post la Japana Katastrofo ĉiun tagon estas kantata en televido la kanto “Ekfloras Floroj” (poezio: Iŭai Ŝuuĵi, muziko: Kanno Jooko). Mi tradukos la poemon laŭlitere.

Floroj floras
Sur la blanka neĝa vojo odoras printempaj ventoj,
mi rememoras mian karan urbon.
Mi havis revon efektivigotan,
ekzistis mi, kiu volis ŝanĝiĝi,
nun mi nur rememoras miajn karajn homojn.

Aŭdiĝas ies kanto,
kiu kuraĝigas iun,
vidiĝas ies rideto
trans la malĝojo.

*Floroj, floroj, floroj floros
al vi, kiu naskiĝos iam,
Floroj, floroj, floroj floras,
Kion mi postlasis?

Je la mateniĝo en la nokta ĉielo,
mi rememoras la karajn tagojn.
Mi vundiĝis kaj vundis,
pro mistaksado pri mi, mi foje ploris.

Nun mi nur memoras
tiujn karajn homojn.

Vidiĝas ies penso,
ligita kun iu,
vidiĝas ies estonteco
trans la malĝojo.

*Floroj, floroj, floroj floros ...
(3-foja ripetado)

Mi povas kanti tiun kanton, sed ĝi ne tre plaĉas al mi. Por kuraĝigi la suferantojn, oni devas uzi esperplenajn vortojn kaj esprimojn, sed ĉar mi vidis multajn suferojn ne venkeblajn en damaĝitaj regionoj, mi ne povas kanti tiun kanton optimisme. En la ĵurnalo Akahata (la 29an de junio 2015) aperis artikolo, temanta pri amatora kantogrupo Kageboošî (Ombro), kiu fondiĝis en 1975 en la gubernio Jamagata, unu el la 6 gubernioj en la norda regiono Toohoku. La grupo kantas la kanton “Kvankam floroj floras”, parodian kanton de “Floroj floras”. S-ro Endoo Kootaroo (62-jara), unu el la membroj, klarigas, kial ili faris tiun novan kanton: “’Floroj floras’ estas versita de la starpunkto de Tokio por homoj en Tokio, do ni ne povas akcepti ĝin”. S-ro Aoki Fumio 61-jara diras: “Mi versis la poemon temantan pri malĝojo kaj kolero de la homoj, kiuj ne povas eĉ vidi florojn en sia hejmloko”.

Mi tradukos la poemon:

Kvankam floroj floras
(poemo: Aoki Fumio, melodio: Jokozaŭa Joŝikazu)

En urboj, sur kiujn falis nukleaĵoj,
same kiel la antaŭaj jaroj venas printempo.
En urboj solecaj sen la loĝantaro,
tamen arboj kaj herboj floras.
* Kvankam floroj floras, kvankam floroj floras,
nenie troviĝas homoj,
kiuj ĝuas printempon.
Sur la tero, kiu vomas venenaĵojn,
floroj velkas kun afliktiĝo kaj kolero.

Pri la homoj forpelitaj en fremdajn lokojn
havas neniun intereson orgia Tokio.
Ĉu ĝi ne havas kompaton al ili,
kvankam elektro, kiun ĝi uzas,
kaŭzis la tragedion?
* Unu jaron, du jarojn, kvin jarojn kaj dek jarojn,
Pro veneno neniam malaperanta la loĝantoj ne povas reveni.
Sonĝante pri hejmaj floroj, ĉu ili devas atendi sian finan tagon en fremdaj lokoj?

La grupanoj loĝas en la gubernio Jamagata, kiu ne suferis la akcidenton. Ili hezitis kanti tiun kanton antaŭ la rifuĝintoj el Fukuŝima. Tamen iun tagon ili kuraĝe kantis la du kantojn “Floroj floras” kaj “Kvnakam floroj floras”. Al “Floroj floras” venis ja pozitiva opinio: “Mi havas

esperon”, sed multaj opiniis negative: “Al mi fontis malespero”, “Kiel floroj baldaŭ velkas, ankaŭ ni povas velki sen restariĝo”. Al la kanto “Kvankam floroj floras” venis tre pozitivaj opinioj kiel “Mi estas kortuŝita” “Vi ne hezitu kanti tiun kanton. Mi sentas esperon”. S-ro Itoo konfesis: “Mi estas vere ĝoja, aŭskultante tiujn pozitivajn opiniojn. Mi denove konsciis, ke la rifuĝintoj estas koleraj pro tio, ke la registaro neglektas la akcidenton, kvazaŭ ĝi ne okazintus”.

La foton mi fotis en la radiuso de 20 kilometroj de la difektita nuklea centralo de Fukuŝima. Tiun ĉi lokon inundis la cunamo kaj la domo malaperis, sed la floroj floras. Kvankam ili floras, la eksaj loĝantoj neniam revenos pro la poluita tero. Vere ĉi tie floroj floras, sed kiom longe ili devas atendi, ĝis la familianoj revenos?